# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

**Organo de FRANCA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, filio de IKUE**

Redaktoro : S-ro Gaston VERON, pl. de la Petite Bruyère, DOMFRONT (Orne)
Sekretariino : F-ino J. LE BOEDEC, 18, rue Ernest Cresson, PARIS 14 -
Kasisto : S-ro J. LIGOT, 30, rue Fernand Segouin, ARNOUVILLE-LES-GONESSE
C.C.P.- PARIS 51 74 79 ( S & O )
Abonnement : 1,75 NF. - Adhésion à la Ligue : 0,75 NF. = Total : 2,50 NF.

N° 55 -- BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO -- Oktobro 1962.


Sankta Pio X, preĝu por ni.

## NIA 29 a KONGRESO EN ROMO.

### KOMITAT-KUNVENO DE LA 9a DE SEPTEMBRO 1962.

Ĉeestis : F-ino Le Boëdec, F-ino Paulier, Frato Marmou, S-roj Muffang, Texier kaj Royer.

Senkulpigis sin : S-roj Barrier kaj Ligot.

Frato Marmou rakontis pri la Roma Kongreso.

La komitatanoj decidis pri la bülteno kiel jam dirite.

S-ro Pierre Royer sin proponis por kontakti katolikan ĵurnaliston favora al nia movado por aperigi rezolucion de la IKUE Kongreso en la gazeto "La Croix". Nia sendo rekte al la gazeto ne sukcesis.

La membroj kiuj prenis la respondecon de artikoloj por franca numero de "ESPERO KATOLIKA", laboras malrapide sed konstante :

S-ro Texier pri " La influo de Katolikismo en la artoj en Francujo".

Frato Marmou kaj S-ro Pierre Royer pri : "Misia impulso en la laboristaj medioj urbaj kaj kamparaj".

S-ro E Thiollière pri "La Katolikoj sur la kampo politika kaj socia".

Kaj jen agrabla novaĵo : S-ro Pierre Royer ricevis promeson de profesia katolika gazetisto por artikolo pri la katolika gazetaro en Francujo, kaj precipe "La Bonne Presse" kaj "La Croix".

Ĉu vi ankaŭ kunlaboros ?

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

PROMENADO EN LA HOUSSAYE-EN-BRIE.

La Pariza Grupo organizas tuttagan promenadon al La Houssaye-en-Brie, dimanĉon 14 an de Oktobro. Meso je 10.30 en la paroĥa preĝejo.

Oni povas kunporti sian manĝaĵon aŭ tagmanĝi en Prieuré Saint-Martin se oni avertas sufiĉe frue Fraton René-Jean MARMOU.

Aŭtobusoj : "Cars MARCEL Gros" 114, Cours de Vincennes : 8.30

"Cars BIZIERE", 102 & 106, Cours de Vincennes: 9.00

Vagonaro "Gare de l'Est" al La Houssaye-Crévecoeur : 7.25
(ligne banlieue : Sézanne-Coulommiers)

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

NIA 29-a KONGRESO EN ROMO.

La suno arde brilis, kiam ni alvenis al Centro PIO XII, kie okazis nia 29-a kongreso. Kiel mirinda loko ! Apud la lago Albano staras la modernaj konstruaĵoj de la kongresejo. En la vasta akceptejo, ĉiu ricevas siajn dokumentojn kaj la ŝlosilon de la pura kaj agrabla ĉambro, kie li pasigos la kongresan semajnon. Kaj ĉie regas jam la bonhumoro kaj la amikeco, kiuj estas la karakteroj de niaj katolikaj kongresoj; ĉiu retrovas siajn amikojn kaj post la vespermanĝo, daŭros la babilado sur la teraso, kie oni vidas la lumojn de Romo kaj aŭdas la grilojn, kies kantkoncerton ni aŭdos ĉiunokte.

La vera kongreso komenciĝos nur la 15-an de aŭgusto kaj estos fruktoplena kaj neforgesebla semajno. Sed mi ne deziras rakonti al vi detale la tutan okazaĵon; nia bulteno ne estus sufiĉe dika por tio; mi do emfazos nur la ĉefajn punktojn, kiujn plej profunde impresis min.

Sendube la plej grava kaj emociiga momento estis la akcepto de Lia Papa Moŝto en Castel Gandolfo. Per aŭtobuso ni atingis la papan palacon, kiu superstaras la lagon Albano, kaj, malantaŭ la verda standardo, ni eniras la internan korton kune kun aliaj grupoj de kredantoj venintaj el la plej diversaj landoj. Niaj okuloj rigardas la balkonon, kie la Papo alparolos nin, kaj post momento Li aperas, dum la ĉeestantaro ĝojkrias kaj aplaŭdas. Lia Papa Moŝto, per afabla mansigno petas silenton kaj per simplaj vortoj, kun granda bonhumoro parolas en la itala kaj franca lingvoj, por danki kaj bonvenigi la ĉeestantojn. Liaj unuaj frazoj mencias "la grupon Esperanto" kaj en niaj koroj estas ĝojo kaj dankemo, pensante, ke la nuna Papo aprobas nian movadon, kiel jam faris PIO X. Poste la Papo atentigis ĉiujn pri la valoro de la Dipatrino, en tiu festotago de la patrino de ĉiuj kristanoj kaj finfine menciis la ok jarojn pasitajn en Parizo, kie lian afablecon ĉiuj memoras. Post kelkaj lastaj vortoj por adiaŭi nin, Lia Papa Moŝto benis la

ĉeestantaron kaj ni forlasis la lokon kunprenante en niaj koroj la memoron de tiu neforgeseble akcepto.

Dum la aliaj tagoj la kongreso daùrigis sian programon kaj oni devas speciale mencii la rimarkindan prelegon de D-ro de la Puente pri la temo : "Dio estas amo", la ĝeneralan kunvenon, kie la ĉiam aktiva kaj laborema sekretariino de IKUE, F-ino Durenkamp ricevis la papan medalon "Pro Pontifice Et Ecclesia" pro ŝia agado en la katolika esperanto movado.

Sed la plej grava trajto de nia 29-a kongreso kuŝas en la granda nombro de junuloj, kiuj aktive kaj gaje laboris. Ili donis al la kongreso ĝian karakteron, kantante dum la ekskursoj kaj ĝojigante la korojn de la malnovaj esperantistoj konvinkitaj, ke, post ili, novaj samideanoj portos alten la verdan standardon.

La junuloj prizorgis la amuzan vesperon kaj plezurigis ĉiujn pro la kvalito de la spektaklo kaj la refreŝiga bonhumoro, kiujn ili alportis en iliajludoj. La skeĉoj kaj kantoj estis altnivelaj sed kompreneble mi ne povas elnomi ĉiujn. Mi nur volas mencii speciale la bonegan puptreatraĵon : "la aventuro de Reĝidino", al kiu sorĉistino ŝtelis trezoron, entuziasmis ne nur la junulojn sed ankaù la plenkreskulojn. Dank'al Fredoleno, sindonema kaj kuraĝa servisto, helpata de nia juna Johano Mario Colleu, la sorĉistino estis finfine venkita kaj Reĝidino retrovis sian trezoron, meze de la aplaùdoj kaj gratuloj al la artistoj.

Post la ekskurso al Assisi la kongreso finis kaj, post bonega kongresa semajno, kies tagoj tro rapide forflugis, ĉiuj devis adiaùi siajn amikojn, novajn kaj malnovajn, ĝis la venonta kongreso, kiu okazos en Valencia (Hispanujo) en 1964.

Katajro.

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

Dépôt légal : 4e trimestre 1962

Papier de presse : N° 34.745-

Polycopié par : F.M.C.
Prieuré Saint-Martin
LA HOUSSAYE-EN-BRIE
(Seine-et-Marne)

--------------------

Directeur de la Publication : M. G. Véron à Domfront (Orne) .

::::::::::::::::::::::::::::::::